

ANA MANERO RICEVIS DIPLOMON PRI ELSTARA AGADO DE UEA

En la Solena Fermo de la 100-a Universala Kongreso en Lillo estis anoncigitaj la nomoj de 12 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado, kiujn ĉiujare aljuĝas la Estraro de UEA. Inter ili, Diplomon ĉijare ricevis nia madrida kaj MEL-ana amikino Ana Manero, pro la gvidado de la projekto *Bitoteko* de Hispana Esperanto-Federacio.

Ana estas sufiĉe konata inter la legantoj de tiu ĉi bulteno, sed vi povas legi ampleksan biografian profilon en la artikolo de la Vikipedio, en jena ligilo: https://eo.wikipedia.org/wiki/Ana_Manero. Ŝi estas la respondeculo de la Biblioteko Juan Régulo Pérez de HEF ekde komence de la naŭdekaj jaroj. Kadre de ŝia biblioteka agado, ŝi lanĉis kaj kun Miguel Ángel Sancho kunordigas la projekton Bitoteko. Danke al ŝiaj klopodoj ĉe la Hispana Ministerio pri Kulturo, estis atingite ke la Bitoteko de HEF iĝu parto de la bitdeponejoj *Hispana* kaj *Europeana*.



Bitoteko estas projekto de HEF kiel cifereca biblioteko, muzeo kaj arkivo. Ĝi entenas librojn, artikolojn, muzikajn pecojn, videojn, ktp, en bita formo, konsultebajn libere por faciligi la aliron de la uzantoj al niaj dokumentoj kaj konservi nian komunan kulturan heredaĵon. Ĝia baza adreso estas <http://bitoteko.esperanto.es/>.

Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA de la jaro 2007, kaj el 2010 ekzistas ankaŭ Diplomo pri Elstara Arta Agado. Jam antaŭe du membroj de MEL ricevis la agnoskon: Augusto Casquero en 2011 kaj Jorge Camacho (Diplomo pri Elstara Arta Agado) en 2013.

Gratulon, Ana!

SOMERAJ RENKONTIĜOJ EN MADRIDO

Dum la monatoj julio kaj aŭgusto pluraj esperantistaj amikoj vizitis Madridon, kaj havis la ŝancon renkontiĝi kun lokaj samideanoj. Kiel anoncite, Rubén Sánchez kaj lia fianĉino, el Argentino, gastis en Madrido survoje al la UK, kaj interalie vizitis la MEL-sidejon la koncernan lundon. Shin Hyunkyū (E-nomo: Mondero) kaj lia frato, el Koreo, vizitis Madridon meze de julio, ene de sia vizito tra Eŭropo, kaj renkontiĝis plurfoje kun esperantistaj amikoj.

Ankaŭ havis la ŝancon renkontiĝi kun esperantistoj la usonano Michael Brandini, kiu vizitis Madridon inter la 11-a kaj 13-a de aŭgusto.

Kiel anoncite en pasinta numero, la sabaton 15an kvin esperanto-parolantoj pasigis agrablan tagon marŝante en la kamparo apud la rivero Lozoya kaj, preterpase, faris turisman viziton al la pitoreska vilaĝo Patones de Arriba. Inter tiuj troviĝis du amikoj el Ĉinio, Lisha kaj Nan, Sinjoro Nan Youli estas veterana esperantisto el Pekino. Lin Lisha loĝas en Madrido de antaŭ ĉ. unu jaro, lernante la hispanan. Kvar tagojn poste kelkaj aliaj esperantistoj kunvespermanĝis kun ambaŭ ĉiniaj amikoj, ĉar ili planis forflugi al Pekino post kelkaj tagoj.

La sabaton 29-an de aŭgusto troviĝis en Madrido nia amiko, literaturisto kaj kritikisto Antonio Valén. Post esperantista laborsesio matene, grupo de amikoj rendezuis kun li en la Parko de Retiro, ĉe la statuo de nia Ricardo Codorniu.

Aliflanke, Didier Loison el Francio anoncis ke li kaj lia kunulo intencas viziti Madridon inter la 5a kaj la 9a de oktobro. Li informos pli detale kiam la planoj estos pli definitivaj.

BIERO KAJ LIMONADO POR KOMENCI LA SEZONON

Post la somera paŭzo, ni rekomencas la kunvenojn en la sidejo la 7-an de septembro. Ni inaŭguros ĝin iom speciale ĉijare, danke al novaĵo: ni havas fridujon!



Por festi la okazaĵon, en la sidejo ni disponos je nova stoko de neindustriaj bieroj, de la markoj "Zamenhof" kaj "Blanka Tigro", kreitaj de la kooperativo "Speranto". Ankaŭ ni havos aliajn trinkaĵojn kaj, eble, manĝetaĵojn. Estos disdonataj diversaj donacetoj alportitaj de S-ro Nan, el Pekino.

Oni do invitas ĉiujn esperantistojn partopreni tiun tagon ĉe la komenco de la fina jarkvarono de la jaro. Homoj rakontos pri siaj spertoj dum la someraj kongresoj kaj renkontiĝoj, kaj estos prezentataj la venontaj renkontoj, inklude de tiuj en Katalunio, Andaluzio kaj la Hispana

Kongreso 2016 en Ekstremaduro. Ni ankaŭ planas diskuti la planojn de la madridaj esperantistoj por la venontaj monatoj.

Pro tiu kialo kaj pro la renkontoj pri kiuj ni informis, ne okazos la babila renkonto de la unua sabato, sed atentu la forumojn, ĉar estas planoj renkontiĝi dum alia semajnfino de septembro.

Ĉiukaze, notu jam la daton de nia unua renkonto: la 7-an, ekde la 18,30 vespere ni atendas vin ĉiujn ĉe la strato Rodríguez San Pedro, 13.

KURSOJ KAJ EKSPozICIOJ

Oni nun fiksas la detalojn pri venonta ekspozicio pri Esperanto en lernejo de la urbo Pinto. Baldaŭ ni informos pri la demarŝoj.

La kurso de Esperanto komenciĝos en la venontaj semajnoj, dum la matenoj de la sabatoj, kiel kutime. Baldaŭ ni diskonigos la precizajn informojn.

RETAJ KONTAKTOJ

Memoru ke, kiel ni informis pasintnumere, nun ekzistas grupo de Esperanto en *meetup*, socia reto kiu celas renkontigi homojn de la sama urbo kun samaj interesiĝoj: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>. Krome, ni povas informi pri bona novaĵo: nia grupo senlimiĝis kontraŭ sama kosto. Aliĝu kaj konfirmu vian ĉeeston aŭ aktivigu la grupon aŭ anoncu aliajn eventojn proponitajn de vi, ktp.

Kiel ĉiam, por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj kaj specife pri la planataj renkontoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, aŭ la retan diskutejon pri ĝeneralaj esperantaj novaĵoj en Madrido http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/.

En la socia reto Facebook, eblas informiĝi kaj debati pere de du forumoj: tiu de Madrida Esperanto-Liceo, ĉe <https://facebook.com/esperanto.madrid>, aŭ la pli ĝenerala por informoj kaj sciigoj <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com